

Johann Wolfgang von Goethe,

## Trovita

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mi tra arbaro  
 Sencele iris  
 Kaj trovi ion  
 Mi ne deziris.

Ĉe l' vojo vidis  
 Mi etan floron,  
 Kaj ege tuŝis  
 Ĝi mian koron.

Kaj kiam volis  
 Mi ĝin deŝiri,  
 „N rompu min!“, mi  
 Ĝin aŭdis diri.

Kaj mi singarde  
 Ĝin elterigis,  
 Al mia domo  
 Ĝin translokigis.

Alialoke  
 Ĝi nun kreskadas,  
 La eta planto  
 Kaj plu floradas.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

## Trovaĵo

*tradukita de Richard Schulz*

Mi vagis sola  
 En la arbar'.  
 Nenion serĉi  
 Jen mia far'.

Enombre vidis  
 Floreton mi.  
 Lumanta stelo,  
 Okulvizi'.

Al mi plukonta  
 Jen ĝia vort':  
 „Ĉu ke mi velku  
 Al frua mort' ?“

Mi ĝin elfosis  
 Kun la radik'  
 Ĝin portis domen  
 Al la larik'.

Replantis tie  
 Ĝin en la fru'.  
 Ĝi nun kreskadas  
 Kaj floras plu.

...

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982-05-05.*

*MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)*

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.*

*Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*